621.3 : 00.14 = 089.2 = 20 = 30 = 40 = 50 = 60 *)

INTERNACIA ELEKTROTEKNIKA VORTARO

D-ro E. Wüster sendis represaĵon de sia germanlingva raporto pri la Konferenco de la Laborkomisiono I, „Terminaro", de la Internacia Elektroteknika Komitato (IEC), kiun li ĉeestis kiel aŭstria delegito. La raporto aperis en „Elektrotechnik und Maschinenbau" (Vieno), **66** (1949) 233-5. El ĝi mi ĉerpas jenon:

2. Lingvoj enprenotaj. En la unua eldono de la IEC-terminaro por ĉiu vorto aplikiĝis aranĝo laŭ jena modelo:

10-05-175	Induit:	Armature:	Anker
	Ensemble de l'enroulement induit et de son support	The armature winding and its support	Indotto Inducido Induktato
Numero	Nomo kaj difino en franca lingvo	Nomo kaj difino en angla lingvo	Nomoj en: germana itala hispana esperanto

La difinoj do estis donitaj nur en la „oficialaj lingvoj" de la IEC, la nomoj krome en ankoraŭ kvar „helplingvoj" de la vortaro.

En Stresa oni nun jene decidis:

La aranĝo de la franca kaj angla kolumnoj restos senŝanĝa. De post la milito, tamen, ekzistas ankoraŭ tria oficiala IEC-lingvo, nome la rusa. Al la Centra Oficejo de la IEC estas komisiate peti la nacian komitaton de la Sovetunio — kiu ne estis reprezentata en la kunsidoj — pri ellaboro de rusa traduko. Konsidere al la kompostaj malfacilaĵoj la ruslingva teksto devos aperi eventuale aparte, simile, kiel la sovetia nacia komitato jam publikigis ĝin en 1936.

El la helplingvoj de la unua eldono, la germana, itala kaj hispana estos konservataj. Krome estos aldonataj ankoraŭ unu skandinavia lingvo, nome la sveda, kaj unu slava lingvo kun latina alfabeto (pola aŭ ĉeĥa).

La kvara helplingvo de la unua eldono estas Esperanto. Ĝia tiama alpreno estis nur eksperimento. En Stresa oni nun decidis prokrasti la decidon pri enpreno de Esperanto en la duan eldonon ĝis la difinoj estos pretaj. La aŭstria delegito atentigis ke antaŭ ol decidi pri enmeto de Esperanto oni kontaktu kun la Teknika Komitato „Terminologio" de ISO (International Standards Organization), la internacia organizaĵo por normoj, kiu antaŭ la milito starigis propran subkomisionon por studo de la problemo de la „Internaciaj Fakaj Terminoj".

Nun niaj legantoj do estas precize informitaj pri la disvolviĝo kaj stato de la afero.

*) Tiel laŭ d-ro Wüster. Bonvolu konforme ŝanĝi en Vol. **1**, pp. 106, 160.

413.164(047) : 408.92

GRAVA RAPORTO DE UNESCO REKOMENDAS ESPERANTON

Raporto — Interlingual Scientific and Technical Dictionaries
de D-ro J. E. Holmstrom (Unesco/NS/SL/1)
(Interlingvaj Sciencaj kaj Teknikaj Vortaroj)

Laŭ komisio de Unesco D-ro Holmstrom verkis ĉi tiun tre detalan raporton pri la problemoj kaj bezonoj de fakvortaroj du- aŭ plurlingvaj. Multobligita, 55 paĝoj kun Aldonoj.

Ĝi analizas ne nur la pure lingvistikan flankon, sed ankaŭ la postulojn de sciencistoj kiuj devas okupiĝi pri tradukado, kaj diversajn problemojn financajn kaj normigajn. Estas zorga kaj detala taksado de la multeco kaj ofteco de interlingvaj vortaroj por diversaj kampoj, klare reliefigante la gravecon de la problemo. La aŭtoro emfazas, ke estas necese radikale esplori la terenon por eltrovi la plej trafan manieron provizi taŭgajn fakvortarojn. Ankaŭ li atentas la vortaristan teknikan problemon de stilo kaj aranĝo, precipe por poliglotaj vortaroj. Li studas la diversajn metodojn por efika transligo de terminoj en la okazoj kiam estas apartaj volumoj por ĉiu lingvo, en kiuj unu duono estas alfabete aranĝita en la koncerna lingvo kaj la alia duono estas aranĝita laŭ sistemo de indeksnombroj kun la rilata vorto flanke; en tiaj okazoj la indeksnombro estas la sama por ĉiu konceptaĵo en ĉiuj lingvoj, kaj la ekvivalento en la diversaj lingvoj estas trovebla per sinturno al la indeksnombro en la vortaro de la koncerna lingvo.

Li pritraktas la sugeston, ke por tiaj celoj la indeksnombro estu tiu de la Internacia Dekuma Klasado, kaj opinias ke tio ne estas praktika ĉar (a) ĝi dependas de la kompleteco de la D.K. sistemo por la koncerna konceptaĵo, kaj (b) la nombroj ne estas facile teneblaj en la kapo dum la transrilatado inter la vortaroj.

Pro tio li rekomendas, ke oni uzu vortojn anstataŭ kodnombrojn por servi kiel „pontoj". Pritraktinte la eblecon uzi, ekzemple, la anglan por la inĝenierado, la germanan por la kemio, la francan por la diplomatio, la italan por la muziko k.t.p., li proponas la jenon. (Por servi al seriozuloj kiuj volos citi la precizajn vortojn ni donas la anglan tekston kun traduko).

„**4.10** Alternatively the „Bridge language" for this purpose might be Esperanto which, being artificial, would avoid national jealousies and have other advantages also. Esperanto grammar is so simple that once its vocabulary was brought to attention in this way actual texts in it would appear merely as filling between the „code words" found in the dictionaries and could readily be understood. (The present writer, who has never tried to read Esperanto before, finds he has no difficulty in understanding most of **Scienca Revuo**, the new quarterly journal). If Esperanto were popularised among scientists and technologists through this incidental use it would offer many practical benefits in other directions as, for instance, in the dissemination of abstracts and the elimination of interpreting at